

Michel Duc Goninaz, lingvisto kaj akordionisto

Jacques LE PUIL

Michel Duc Goninaz mortis . . . jen kion mi aŭdis telefone de malnova konatino. La ŝoko estis vere tre granda, ĉar mi tute ne antaŭvidis tiel rapidan foriron.

Kun Michel ni konatiĝis antaŭ preskaŭ 40 jaroj; mi tiam estis 36-jara kaj li 42. Kiam kadre de la gazeto de la junaj SAT-anoj mi kreis la “Epikuran grupon”, tuj Michel aliĝis al tiu tute neformala grupo. Post la kreado de *La KancerKliniko*, Michel kontribuos al ĝi ekde la numero 4, oktobro/novembro/decembro 1977 kun artikolo kies titolo estis “El la taglibro de neŭrozulo”. Poste lia artikolo havos la nomon “El la taglibro de nekuracebla optimisto”.

En 1978 Michel invitis min kanti antaŭ liaj lernantoj en la universitato de Aikso Provenca. Poste ni multfoje vizitis lin. Mi neniam forgesis la tagon, kiam ni (Armela kaj mi) devis lasi ilin (Michel kaj lian edzinon Arlette) por reveni al Tomje. Pli-malpli je la 10-a matene mi prenis mian gitaron kaj Michel sian akordionon. Kaj ek al kantado de multaj kanzonoj. Unu post la alia kaj tiam alvenis la horo por tagmanĝi. Tro malfrue por foriri al Tomje, kaj do ni remalpakis la valizojn por pludormi en Aikso!

Jes, Michel ne nur estis la brila lingvisto kiun ĉiuj konas dank’ al la Nova PIV, sed ankaŭ bonega akordionisto kaj ŝatanto de kanzonoj. Cetere li, tre juna, tradukis “La Kavaliroj de l’ ronda tablo”-n (kun revizio de Rajmondo Ŝvarc), kiun mi registris en mia dua KD “Sen elizi”. Polemisto li estis kaj malfacilis kontraŭi lin! Tamen tio okazis unufoje, sufiĉe draste, okaze de artikolo kiun li sendis al LKK. Temis pri la bombado de Jugoslavio: Michel skribis tiam: “Tion ili meritis”. Mi diris al li, ke mi rifuzas tion aperigi, kaj post longa diskutado, li fine rezignis.

Ĉu esperantistoj meritis havi tiun elstarulon? Mi opinias ke jes, kaj dank’ al la Nova PIV kaj liaj tradukoj, lia nomo restos longtempe en la koro de ni ĉiuj.

Ricevita 2016-08-07

Akceptita por publikigo 2017-06-08